
# LA VERDA LUPEO FENĪKSO

Nr-ro 45 | 1979-2 Julio | 10a jaro

## Kluba informilo de ELF–AREK

**ELF: Esperanto Ligo Filatelista**
**AREK: Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj**


















## Rareco de E-stampoj

Certe estus por ĉiu el ni interese scii, kiu stampo estas pli kaj kiu malpli rara. Necesus do iel klasifiki kaj dividi ilin en certajn grupojn. Maniero de simila divido ekzistas kaj estas en praktiko dum filatelaj ekspozicioj fare de ĵurio uzata. Pli suba tabelo montras, kiel oni priktaksas filatelan materialon (poŝtmarkojn, tutaĵojn, stampojn, afrankitajn kartojn k kovertojn).

| Ŝtupo de rareco | Nombro de konataj ekz. | Rareco | Int. signo |
|---|---|---|---|
| 1. Unikaĵo | 1 | unika | U |
| 2. Monda raraĵo | 2–10 | tute eksterordinare rara | RRRRR |
| 3. Internacia raraĵo | 11–30 | eksterordinare rara | RRRR |
| 4. Granda raraĵo | 31–100 | tre rara | RRR |
| 5. Meza raraĵo | 101–300 | rara | RR |
| 6. Malgranda raraĵo | 301–1000 | malpli rara | R |
| 7. Valora materialo | 1001–3000 | valora materialo | — |

Tiu ĉi tabelo estas tute oficiala – uzas ĝin ĵurioj dum internaciaj ekspozicioj kaj FIP.

Dividi stampojn laŭ tiu tabelo estus utila pro kelkaj kaŭzoj:

a) ĝi estus ne nur bona bazo por interŝanĝo, vendo kaj aĉeto de stampoj, sed ankaŭ montrus al ĵurioj, kiel valoraj estas niaj E-stampoj kaj helpus do certe al pli bona pritakso de kolektoj dum ekspozicioj. Ankaŭ ĝi certe plialtigus prestiĝon de Esperanto en neesperantaj medioj, kiel mi mem konvinkiĝis post publikigo de simila divido (kiun mi faris kiel unuan provon kaj kiu kompreneble ne povis eviti subjektivecon k plurajn mankojn),

b) ĝi estus certe interesa por ĉiu el ni, eĉ se oni ne ekspozicias siajn kolektojn,

c) ĝi certe estus bona, taŭga kaj necesa materialo por luksa katalogo pri ĉiuj E-filatelaĵoj, kiun ni intencas prepari honore al 100 jaroj de Esperanto.

La problemo kuŝas ĉefe en tio, ke neniu el ni konas veran nombron de E-stampoj, kiuj ekzistas: sed ni povas provi fari statistikon almenaŭ inter nia membraro. Tial ni petas ĉiujn niajn membrojn plenumi la demandofolion aldonitan al la hodiaŭa numero de nia revuo kaj sendi al la adreso de nia amiko Vana. Ege bezónataj estas ankaŭ informoj pri pritakso de tiuj stampoj en diversaj katalogoj kaj dum aŭkcioj – kiu povas sendi tiajn informojn, helpu! (Necesas skribi landon kaj numeron de stampo, ĝian valoron, en kiu valuto, laŭ kiu katalogo, en kiu jaro la katalogo aperis.)

Mi volas substreki ĉi-tie tri aferojn:

1) la sukceso de tiu ĉi cetere nefacila laboro dependas de tio, ĉu *ĉiu nia membro* helpos: ni ne povas fari ekzaktan statistikon, se respondos nur kelkaj. Ĝuste tial, por plifaciligi la aferon, ni preparis aldonitan folion, kiun oni nur plenumu per nombro de stampo, kiun oni posedas. Helpi povas ĉiu, eĉ tiu, kiu havas nur malmultajn stampojn – ja ni bezonas kiom eble plej precize scii, kiom da ekzempleroj de ĉi stampo ekzistas inter ni.

2) ĉiuj informoj estas konfidencaj kaj estos uzataj nur por ellaboro de statistiko. Tial ne necesas sendi listojn de tio, kion oni havas en la kolekto kaj kion oni havas duoble – en la foliojn oni skribu nombron de ĉiuj ekzempleroj de la koncerna stampo. Vi ne bezonas timi ĝenajn petojn de iu pri interŝanĝo ktp.

3) kiu scias pri aliaj kolektantoj – nemembroj de nia klubo, petu ankaŭ ilin pri helpo, eventuale helpu al ili plenumi la foliojn. Bezonatajn pliajn foliojn petu de la redaktoro.

Ankoraŭfoje: ĉi laboron ne eblas sukcese fari sen aktiva helpo de ĉiu membro de nia "amika rondo" – do estas morala devo por ĉiu el ni helpi. La rezultoj estos kompreneble publikigitaj por bezono de niaj membroj.

*Vladimir Vana*

## Hodmezövasarhely 1947

Sinjoro Stefano Fekete el Hungario skribas, ke tiu stampo ekzistas en du varioj: en hungara kaj en Esperanto. Kiu el ni povas sendi fotokopion al redaktoro?

## Nova franca stampo en Parizo 1979

31an de marto 1979 okazis en la urbeto Cerny apud Parizo kongreso de la Esperantistoj de la pariza regiono. Oni aranĝis specialan poŝtan memorigan stampon, uzita nur dum 1 tago: "CONGRES PARIS ILE de FRANCE ESPERANTO 31 MARS 1979 PHILATELIE 91 CERNY"

Nia glumarka fakulo Gaston Tremon sendis al interesuloj tiun stampon kaj esperas ricevi rekompencon. Li atendas ankau informojn pri novaj glumarkoj.

## Nova sveda E-stampo

2–6 1979 okazis en Kungälv Sveda Jarkongreso. LKK mendis specialan poŝtan stampon kiu estas nun havebla en nia banko ĉe sinjoro Heimlich. (pron.: hajmliĥ)

## Novaj hungaraj en 1979!

Nia Vilmos Radnai informis, ke ĉi-jare en pluraj hungaraj urboj oni uzos poŝtajn E-stampojn, i.a. en Miskolc, Hodmezövasarhely kaj en Budapesto. Sekvontnumere pli!

## La E-pm de Ukrainio (USSR)

Sinjoro Barmaneter el FRG informis pri tiuj pm:

Lau la Michel-katalogo ili havas la jenajn prezojn:

| | | |
|---|---|---|
| 3 r sur 1 r (rektangula akvosigno) | + 18 000.– | o = 24 000.– gmk |
| 3 r sur 1 r ("meandra" akvisigno) | + 17 000.– | o = 18 000.– gmk |
| 10 r sur 1 r | + 600.– | o = 20 000.– gmk |

("+" signifas neuzita, "o" stampita)

La surpreso estas la jena: B. ALEX (mallongigo por Bolŝaja Aleksandrovka) 16.8.41 (hokokruco) valoro.

La surpresoj sur la pm de Sovetunio estis faritaj dum la faŝistgermana okupado de Sovetunio de la okupacia armeo.

**La E-poŝtkartoj de Liechtenstein**

Sinjoro Barmaneter informis, ke ekzistas la jenaj:

1930 20 Rappen 6 diversaj pk kun bildoj
1931 10 Rappen 10 diversaj pk kun bildoj
1931 20 Rappen 10 diversaj pk kun bildoj
1931 10 k 20 Rappen sen bildoj
1937 surpreso 10 sur 20 Rappen, 10 div. pk kun bildoj
1937 10 sur 20 Rappen sen bildo

La prezo por unu karto estas inter 20.– ĝis 40.– gmk. Ili estas raraĵoj kaj apenaŭ troveblaj sur la filatela merkato.

Estas ja konate, ke nia klubano Vana pretigas tutaĵkatalogon, kiu eble jam ĉi-jare pretiĝos, sed certe sekvontjare.

**Simon pri usona afrankstampo:**

Tiu afrankstampo estis uzita de s-ro M. Stigers, kiu mendis ĝin por uzo en afrankmaŝino de la firmao, por kiu li laboras. Li afrankis la bultenon de Espermenso, kiun li forsendis dum kelka tempo, kiam li estis ĝia sekretario. S-ro Stigers ne plu estas la sekretario kaj bedaŭrinde forĵetis la kliŝon. Sendube membroj de Espermenso tiam ricevis la bultenon kun tiu afrankstampo. (1974)

## Pri la Haga stampo de 1920

En la 39-a n-ro de nia bulteno estis reproduktita poŝtkarto, forsendita 1920 el Hago, kie okazis la XII-a UK de Esperanto. Je unua vido la ĉeĥlingvan tekston skribis knabo kaj esperantigita signifas: "Panjo, mi sendas al vi koran saluton el Hago. Blazék Zdenék".

Ĉar estas dubo pri ĝia poŝteco (ne ekzistas mencioj pri ĝi en la tiutempa dokumentaro), mi esploris la aferon rekte ĉe la skribinto, vivanta ankoraŭ en Prago, s-ro Dro Ing. Zdenek Blazek, mia konato, filatelisto, sed ne esperantisto. Montrinte al li la reproduktaĵon, li tuj rekonis sian knabecan manuskripton kaj subskribon. Li diris: "Jes, tiun poŝtkarton skribis mi. Mia patro estis fervora esperantisto kaj kunprenis min partopreni la kongreson en Hago. Mi estis tiam 10-jara knabo kaj tiam pliinterresiĝis pri glaciaĵoj ol pri la kongreso kaj stampado de poŝtaĵoj. Tamen mi bone memoras, ke en la kongresejo ne estis uniformita poŝtisto, nur civilvestitaj personoj, kiuj laŭdezire stampis bildkartojn per stampilo, kies stampaĵo troviĝas sur mia poŝtkarto. Mi ne pensas, ke ĝi estas oficiala poŝta stampo, sed nur memoriga kongresa apudstampo farita de LKK."

Jen ĉio, kion mi sciiĝas de la nun grizhara skribinto de la "Interesa Trovitaĵo" en posedo de amikoj Vana, Amouroux kaj s-ino Strönne. Tamen mi rekomendas plu esplori la aferon rekte en Nederlando.

*FABA (Bartoŝik)*

**Anonco:**

Mi interŝanĝos neŭzitan aŭstran poŝtkarton kun enpresita verda 20-groŝa Esperanto-pm. Skribu proponon al: Stanislao Biesiada, pk. 599, PL-42-217 CZESTOCHOWA 17, Pollando.









## La E-pm de la regno de ATLANTIS kaj LEMURIA

La filatelisto Norman Williams verkis artikolon pri t.n. "kvazau-poŝtmarkoj", kiuj enhavas enskribojn en Esperanto, eldonitaj de la regno Atlantis-Lemuria. Tiu artikolo estas en la novembra-1978-eldono de "The Stamp Magazine". Nia nova klubano Mc Callum trovis ĝin kaj sendis la anglalingvan eltranĉon al la redaktoro. Jen resumo:

Grupo da skandinavoj eksetlis sur aro da 14 insuletoj inter Miami kaj La Habana. Odina estis ilia centro. Ili intencis, fondi propran regnon kun la nomo ATLANTIS kaj LEMURIA kaj ili instalis ankaŭ propran poŝtservon kun propraj poŝtmarkoj.

En decembro 1934 aperis la unuaj tri poŝtmarkoj kun bildo de neptuno kaj la enskribo "SERC-KREDI-VIDI". Supre en la markoj aperas la nomo ATLANTIS kaj maldekstre la valoro: 2, 3 kaj 7 "skaloj". La dentumitaj markoj estas tri-angulaj. Sur la 2-skalojmarko nigra sur flava papero estas presita nur la enskribo, la reste estas presita en senfarba reliefe. Sur la 3- kaj 7-skalojmarkoj, nigra sur flava kaj nigra sur oranĝa, estas presita la tuta markbildo.






1935 aperis dua serio en du varioj. La markoj montras bildon de virino kaj la enpreson MARIE. La koloroj estas:

5 skaloj: blua sur helblua, perf.: 12 kaj sendenta
10 skaloj: oranĝa sur viandkolora, perf. kiel 5 sk.
25 skaloj: ruĝa sur flava, perf.: 12
50 skaloj: karminruĝa sur ledfarba, perf. kiel 5 sk.
75 skaloj: verda sur palverda, perf.: 12
1 "dalo": viola sur palviola, perf.: 12
portreto kaj valorenpresoj estas nigraj.

De tiu ĉi serio ekzistas kelkaj markoj kun surpresoj en blunigra LEMURIA aú Y MU.
1938 aperis tri aliaj serioj:


| | |
|---|---|
| 75 skaloj: blua k oranĝa (kun flago) | sendenta |
| 75 skaloj: blua (soldato) | sendenta |
| 75 skaloj: viola (templo) | sendenta |

"KVIN DALOJ" (princino kaj princo de Atlantis) (2a eld.)
4 D (Neptuno)
5 D (Neptuno)
3 skaloj kun mapo de Atlantis kaj Lemuria (3a eldono)

La jenaj filatelaj katalogoj enhavas menciojn:
- Gibbons Stamp Monthly, vol 11 p 184 (junio 1938)
- Billigs Philatelic Handbook, vol 30 (1964)
- Les Timbres de Fantaisie (Bourdi 1968), p. 111

La tuto prezentas al ni interesan aferon kaj endus plie esplori. Sendube iuj esperantistoj ludis rolon en ĉi afero. La artikolo estas multe pli longa sed mi ne kuraĝis kun miaj preskau-ne anglalingvo-scioj ĉerpi pli el tiu artikolo. Kio signifas "Cinderella" = ĉu "cindrulino"?

*R. Burmeister*




## Pripensoj pri kolektado kaj paĝo de historio

En la n-ro 41 de nia bulteno mi legis kun intereso la rimarkon de nia amiko Burmeister pri "kaŝita" E-stampo.

Mi tute konsentas kun lia analizo tiom pli ke, sur la filatela kampo, nia temo plene maturiĝis kaj, kiam ĝi estas racie kaj ĝisfunde pritraktata, ĝi kaptas la atenton de ĵurioj kaj neesperantistaj vizitantoj tiel povante pretendi la plej altajn agnoskojn de altnivelaj ekspozicioj.

Samkiel trafe klarigis nia amiko Vana (vidu en "Fenikso" 28–29) mi opinias ke

en filatelaj ekspozicioj ne sufiĉas vidu en "Fenikso" prezenti sinsekvan aron da E-filatelaĵoj sed estas multe pli bone kaj esperdona "skribi" paĝojn de la historio de E kaj de la movado ilin ilustrante per filatelaĵoj kiuj rilatas al E, ne nur dank' al E-pm, stampoj kaj tutaĵoj.

Kial do ne envicigi kovertojn, kartojn, p.m., stampojn de aŭ pri E-pioniroj, foiroj, radiostacioj, institucioj k.a. kiuj, kvankam neesperantistaj, uzas aŭ uzis Esperanton. Substreki ke E estas uzata en grava kaj neesperantista medio estas multe pli celtrafa ol paroli nur pri E inter esperantistoj.

Do la nuna afrankstampo de UEA, eĉ se ĝi silentas pri reklamo, meritas sur- kaj ne subtabliĝon kvankam ĝi ne ricevos enlistigon en katalogon de E-poŝtstampoj.

Jen alia samtipa ekzemplo: temas pri la poŝtstampo de la "Palaco Wilson" en Ĝenevo.

En 1936 disduiĝis la neŭtrala E-movado kaj kreiĝis "Internacia E-Ligo" (I.E.L.) kies sidejo estis en Britio. UEA tamen vivetis kaj ĝia sidejo restis en Ĝenevo.

La 27an de septembro 1937 la ĝeneva "Palaco Wilson" – laŭ la nomo de Prezidento Wilson, fondinto de la Ligo de Nacioj – estinta sekretariejo de la iama Ligo de Nacioj estis inaŭgure disponigita al 30 internaciaj institutcioj kaj asocioj kies sidejo ĝuste troviĝis en Ĝenevo. UEA ricevis ejon en la tria etaĝo kiun grandparte okupis la "Internacia Labor-oficejo".

En 1947 reunuiĝis la neutrala E-movado kiu reprenis la unusolan nomon: UEA. La sidejo estis tiu de la ne plu ekzistanta IEL, en Britio, kaj ĝi poste translokiĝis en Nederlandon.

Mi posedas kelkajn dummilitajn korespondaĵojn de UEA en Ĝenevo (funkciis i.a. "Zamenhofa interhelpa servo", kiu celis peri la transsendon de korespondaĵoj de esperantistoj el militantaj landoj) sed, krom naziaj cenzuroj, mi rimarkis nenion aparte menciindan koncerne la poŝtajn stampojn. Ili estas tute ordinaraj ĉu meĥanikaj, ĉu permanaj.

En 1965/1966 Hans Jakob kiu rolis en la skismo de 1936 rekomencis kverele agitadi per bulteno "ESPERANTO" (ni rimarku ke li konservis laŭtitole kaj laŭaspekte la organon de UEA) kiun li dissendis el lia "Internacia Esperanto-oficejo" kiu sidejis ĉiam ĉe "Palaco Wilson" en Ĝenevo.

Mi posedas koverton senditan de li la 3an de marto 1966 kaj notindas ke la enpresita adreso: "ESPERANTO" . . . 1211 Geneve 14 ĝuste retroviĝas en la speciala poŝtstampo de la ankaŭ surstampe nomita "Palais Wilson". Filatele, la tuton plivalorigas alia oklatera (okangula) stampo "P.P.", kiu anstataŭas afrankon.

Kvankam por neesperantista publiko ne necesas skribi pri tiu malbenita epoko de kvereloj, evidentiĝas ke por ni, esperantistaj kolektantoj, tiu dokumento estas interesa ĉar, eĉ se "kaŝita", ekzistas rilato inter la speciala stampo "Palais Wilson" kaj la internacia E-oficejo de Hans Jakob.

*Jean Amouroux*




## Luzernaĵoj

Por la nova E-pm de Svislando aperis ankaŭ poŝtoficiala Unuataga Koverto (UTK). Krome ni atentigas pri maksimumkarto kolora, kiu montras la E-balonon, la E-pm kaj la unuatagan stampon. Sur la filatela merkato ankaŭ estas kongresa koverto kun la nova E-pm kaj "aldona propaganda stampo". Ĉu poŝta ni ne scias. Supre nomitaj objektoj estas haveblaj kontraŭ po du IRK aŭ po 1.80 sv. Frankoj, (ankau eblas neuzitaj svisaj pm validaj en tiu nominalo) ĉe la Filatela Servo Esperanto Balono, Wiesbacher Str. 6, 8053 Zürich.

S-ro Fritz Liechti, pioniro de la balono kaj proponinto de la nova E-pm afable sendis tiujn informojn kaj samtempe sciigis, ke svisa poŝto dum la UK uzos specialan memorigan stampon. Oni esperas, dum la UK aranĝi specialan 2an balonpoŝtflugon. Intertempe la balono jam ofte flugis propagandcele super Svislando kaj diversaj firmaoj jam petis ĝian uzadon.

S-ro Simon informis, ke oni en Svislando uzis de la 1.2.79 maŝinpoŝtan varbstampon por la UK. Bedaurinde la redaktoro ne posedas supre cititajn filatelaĵojn, eĉ ne eblas prezenti foto-represojn manke de materialo.

Al la kongresanoj ni rekomendas atenti pri specialaj reko-markoj en la kongresaj poŝtaj giĉetoj kaj utiligi por la poŝta ekspedo la e-pm, la pm "800 jaroj Luzern", la kongresan koverton kaj laste la poŝtan specialan nuligan stampon. La tuto prezentas efikan filatelaĵon. Nepre atentu pri la poŝtaj tarifoj kaj ne superafranku viajn sendaĵojn!

Dum la UK en Luzern okazos speciala kunveno por niaj membroj. S-ro Lech Kosieniak afable konsentis iomete gvidi la aferon kaj priparoli niajn problemojn. Nepre kunportu kelkajn viajn duoblaĵon por interŝanĝo.

S-ro Kosieniak estis tiu, kiu disponigis la foton pri la E-pm por la titola paĝo de nia informilo. Dankon al li kaj ankau al sinjoroj Liechti kaj Simon pro senditaj informoj.

## Novaj glumarkoj:

Nia klubano Vilmos Radnai pretigis la jenajn novajn glumarkojn:
- Internacia Jaro de la Infano 1979
- Landa Fervojista Renkonto Esperantista 1979 (ronda)
- Sama okazo sed pentagona

Plie mi trovis sur leteroj la jenajn E-glumarkojn:
- SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET Årskongress 1979 Kungälv
- Internacia Jaro de la Infano 1979

## Insignoj

La redaktoron ne atingis informoj pri E-insignoj novaj. Eble insignoj elmodiĝas? Tamen, okaze de IFER 79 en Leipzig (pron. "lajbciñ") la LKK eldonis belan insignon:

*Ronda, metala, kun verda stelo sur ora grundo, orlitere: IFER sur blua grundo kaj sube Leipzig en blua koloro sur ora grundo.*

La redaktoro kore petas ĉiujn niajn membrojn, raporti kaj pri novaj kaj pri malnovaj insignoj. Ja ekzistas speciala "insigno-klubo esperantista", tamen ankau tiu klubeto stagnas kaj ne informas pri novaj insignoj. (Certe manke de informoj). Anoncita "katalogo de sovetuniaj E-insignoj" ne aperis.

## Privata alpreso sur GDR-poŝtkarto

Okaze de la fonda kunveno de Medicina E-Fakrondo en Kulturligo de GDR en Schwerin, 2.12.1978 la LKK alpresigis koncernan tekston sur normala 10-feniga-poŝtkarto. Tiu poŝtkarto estas havebla de Dr. G. Brosche en DDR 7981 Rückersdorf kontraŭ 2 validaj IRK.



## Nepoŝtaj memorstampoj en Maria Alm

Germano Gimelli sendis salutkarton al la redaktoro (dankon!), kiu havis du belajn memorstampojn nepoŝtajn pri la 20a IFES. (Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno en Maria-Alm, 1979.)

## Memoriga koverto de E-kongreso en Cerny

LKK organizis memorigan koverton pri la PARIZA FEDERACIA KONGRESO ILE-DE-FRANCE + ESPERANTO (= teksto alpresita). La koverto montras maldekstre katedralon de Cerny, afrankita kun pm 0.80 pri pariza La Nova Ponto kiu surhavas la poŝtan E-stampon de la kongreso. Pri la koverto raportis Gimelli, dankon al li!

**Anonco:**
10 memgluaj E-glumarkoj pri la sveda jarkongreso 1979 kostas 3 IRK. Petu ilin de Sinjorino Marianne Nilsson, 1063 Svenstorp, S-446 00 Älvängen.

---

Franz Luyten, Boekenberglei 256, B-2100 Deurne serĉas neuzitajn E-pm, donas stampitajn.

---

Sinjoro KURIYAMA (vidu 1979/1) kolektas poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj aerogramojn de Japanio, Anglio, Usono, Francio kaj UN, sed ankaŭ esperantajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj stampojn.

---

Sinjoro MORAUD (vidu 1979/1) deziras akiri ĉiujn E-pm kaj specialan e-filatelan katalogon. (Katalogo pri stampoj kaj e-pm estas havebla ĉe W. Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4.)

---

**Adreskorekto:**
Sinjoro Berkhout havas la antaŭnomon *Piet*, ne "Paul" Do: jen la korekta adreso de nia novmembro:
Piet Berkhout, Lindelaan 18, 1561 CL Krommenie
Li kolektas Esperanto-filatelaĵojn kaj pm pri blazonoj (heraldiko).

---

**Ni bonvenigas:**
F. Frederick Nietert, P.O. Box 949, Douglas, Arizona 85607, Usono. Li kolektas ĉiujn E-filatelaĵojn. Novkolektanto.

---

**Bonvenon al niaj novaj membroj'**

Prof. Dr. Dalibor Brozović
Filozofski fakultet
YU 57 000 Zadar

Li kolektas insignojn, medalojn kaj E-filatelaĵojn, sed ankaŭ glumarkojn. Komencanto sur kampo de kolektado. Pli ofte restadas en Varsovio, Moskvo kaj Praha k serĉas kontaktojn al tie-aj kolektantoj.

Elvizio Bueno Rodriguez
Rua da Penha 455, Cx.P. 234
18 100 Sorocaba – SP
Brasil

Li kolektas filatelaĵojn pri skoltismo kaj Esperanto. Povas sendi stampon de Sorocaba. Komencanto sur E-filatela kampo.

---

**ELF–AREK-KLUBO**

**Prezidanto:** Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3

**Kasisto:** Same. Sendu jarkotizon de 15 IRK au 25 sv. kronoj. Poŝtkonto 51 57 85-4

**Vicprezidanto kaj stampobanko:** Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4

**Redaktoro de nia kluba informilo:** Rudolf Burmeister, DDR-9047 K-M-Stadt, W. Firl-Str. 30

Al la redaktoro sendu ĉion por la informilo: sciigojn k specimenojn pri novaj E-filatelaĵoj, glumarkoj, insignoj, viajn artikolojn, opiniojn kaj dezirojn.

---